Partoprenu la konkurson de poezio por junuloj, *Poezio tut'libera* !

Poezio tut'libera (Poésie en liberté) estas internacia konkurso de poezio kreita en 1998 en franca mezlernejo.
Ekde 2018 estas ankaŭ akceptitaj **esperant-lingvaj poemoj**

- Temo kaj formo liberaj
- Partopreno senkosta
- Partopreno malfermata por ĉiu junulo de 15 ĝis 25 jar-aĝaj, de ĉiu lando
- Partopreno nur tra la retpaĝaro www.poesie-en-liberte.fr

ETAPOJ DE LA KONKURSO 2019

- de la 1-a de januaro ĝis la 30-a de aprilo 2019 : sendo de la poemoj fare de la partoprenantoj
- en majo : la ĵurio elektas la premiatojn
- fine de junio : oficiala proklamado de la rezultoj en Parizo kaj publikado de ĉiuj rezultoj sur la retpaĝaro
- en oktobro : eldono de cento da poemoj selektitaj de la ĵurio sub formo de ĉiujara Antologio
- fine de novembro : la premiitoj estas invitataj tri tagojn al Parizo por viziti kaj partopreni en antaŭ-publika ceremonio por la transdono de la premioj.

REGULARO *[Resumo de la originala regularo en la franca]*

Poezio tut'libera estas internacia konkurso de **franc-lingva poezio** tra la Reto, publikigita en la « Bulletin officiel de l'Education nationale » (oficiala bulteno de la franca ministerio pri edukado). Estas organizata de la Asocio « **Poésie en liberté** » (Poezio en libereco – Poezio tut'libera).
En 2019, duafoje, estos akceptataj **poemoj en esperanto**.

La konkurso estas malfermata al ĉiuj junuloj, inter 15 kaj 25 jar-aĝaj.
La partopreno konsistas en la sendo de neeldonita poemo, versa aŭ proza, maksimume 30 versojn aŭ liniojn longa. Ĉiu kandidato povas proponi nur unu poemon. Tamen oni povas proponi unu poemon franclingve kaj alian esperantlingve.
Oni devas nepre uzi la specialan formularon de la retpaĝaro – www.poesie-en-liberte.fr.
Ĉiu kandidato, per sia sendo, garantias la aŭtentecon de sia teksto.
Por ke la partopreno estu validigita, la send-formularo de la poemo devas esti ĝuste kaj komplete plenigita.
Por sia partopreno en la konkurso, la kandidato konsentas :
- la eldonon de la teksto sur la retpaĝaro de la konkurso kaj la retpaĝaroj de la kun-agantoj.
- la eldonon en antologio de sia teksto.
- ĝian uzadon, senpage, por pedagogiaj kaj kulturaj celoj.

La tekstoj devas alveni al la organizantoj antaŭ la lim-dato, nur pere de la retpaĝaro.
La listo de la premiitoj estos publikigita sur la retpaĝaro ekde la monato junio. Ĉiu premiito estos informata.

PREMIO-LISTO

La premio-listo komprenas :
- naŭ kategoriojn franc-lingve

- Ses premio-listoj de Francio
- Tri premio-listoj internaciaj

Premiitoj de ĉiu kategorio estos invititaj al Parizo 3 tagojn kaj partoprenos la finan ceremonion.
- unu kategorion esperant-lingve
Almenaŭ unu premiito estos invitata al Parizo 3 tagojn kaj partoprenos la finan ceremonion.

Kontaktoj aŭ demandoj
gillestabard.PEL@gmail (esperantlingve)
www.poesie-en-liberte.fr (franclingve)

Association Poésie en liberté
Maison des Associations
38, boulevard Henri IV
75004 Paris, France